10-a JARO, N-o 411 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. NOVEMBRO 1933.

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 23, rue Boyer, Paris 20e
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 358 189, S'Gravenhage n-o 211 533, Kopenhago n-o 4 986, Leipzig n-o 85 148. Paris n-o 1234 22, Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT, bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « L. Bannier ».

TRA LA VENTEGOJ

Kiam fariĝis fakto, ke K-do Lanti forlasis la gvidadon de SAT, ni sentis la neceson ne nur diri nian bedaŭron, sed ankaŭ nian varman dankon pro la farita laboro k ĉefe pro tio, ke li signis al ni la vojon. Sed verdire, ni estis iom embarasitaj. Estas ja malfacile paroli tute objektive pri la meritoj de homo, kun kiu oni kunlaboris intime dum multaj jaroj, — k ni scias, ke Lanti juĝus pri ni severe, se li opinius, ke ni direktas al li flatajn banalaĵojn.

Feliĉe forigis nian embarason la redaktoro de « Laborista Esperantisto » (organo de la nederlanda LEA). En ĝia oktobra n-ro ja aperis nederlandlingve artikolo pri nia gvidinto. Ni do simple publikigos ĉi sube ties tradukon, kiun bonvolis havigi al ni K-do Alings.

Pro la motivo pli supre eldirita, ni aldonas nenion al la dankesprimo de niaj holandaj K-doj. Sed almenaŭ ni volas mencii, ke la publika, konata laboro de Lanti eble ne estas la plej grava, la plej dankinda. Ni volas diri per tio, ke li faris tute *anonime* tre multan laboron k ke lia abunda, ampleksa persona korespondado kun K-doj el la tuta mondo tre utilis, ĉefe en okazoj, kiam SAT-anoj ŝanceliĝis pro nesufiĉa informiteco pri iaj aferoj. Multaj, tre multaj K-doj povas atesti, kiom da bono, da profito, da fervoriĝo ili ĉerpis el liaj leteroj, ofte rapide k eĉ fuŝe skribitaj.

Vole nevole, per sia agado Lanti fariĝis mondkonata en la esperantistaj rondoj, sed ni scias, ke neniam li celis k eĉ pensis penadi por akiri popularon. Lia karaktero estas tiu de severa *individuisto*, kiu celas nur al kontentigo de sia propra konscienco k memjuĝo.

Dum Lanti gvidis la SAT-organojn, neniam li konsentis al tio, ke lia portreto aperu en ili, kvankam multaj legantoj deziris tion. Sed lastatempe, en Skandinavio, li estis tiom ofte fotita k portretita, ke estus liaflanke ia afekto, se li ne konsentus liveri al ni bildon, kiu montras lin laŭ la ordinara aspekto, kiun li havas, irante al sia lerneja laboro. Pri tiu punkto ni do pekas kontraŭ lia ekzemplo ; certe neniu leganto riproĉos al ni pro tio...


En nia propra nomo k en tiu de multaj, tre multaj SAT-anoj, — pri tio certigas nin ricevitaj leteroj, — ni dankas al la SAT-ano *Unua* k promesas fidelon al liaj instruoj : fariĝi memstare k racie pensantaj homoj k senĉese plifortigadi nian konvinkon, ke la tasko ekipi la proletan klason per mondlingvo estas plej grava, plej necesa k inda je ĉiaj oferoj.

L. Banmer, N. Bartelmes.

Kiam hodiaŭ oni parolas pri K-do Lanti, ni scias, ke ne plu temas pri iu nekonato. En la vicoj de la esperantistoj, k precipe en la laborista esperanto-movado, lia nomo ricevis certan famon.

Ne nur en nia lando, pro nia propagandado por SAT, sed en la tuta esperanto-mondo, kie li havas siajn amikojn k... kontraŭulojn. Li ne estus eminentulo, se li ne havus ankaŭ ĉi lastajn k, ni povas aldoni, lia laboro ne estus havinta signifon aŭ enhavon. Sekve oni ja foje parolis pri la « Lantiismo ».

Li montriĝis esti gvidanto k karakterizas lin tia la fakto, ke li, kvankam laca k malĝojigita pro multspeca



E. Lanti

kontraŭagado en propra kampo, ne forlasis en kriza tempo sian postenon, kiun li akiris pro siaj spiritaj kvalitoj, k nur nun senŝarĝigis sin, ĉar montriĝis, ke estas savita lia ŝipo k pilotita en sandanĝeran havenon. Dekdu jarojn ĝi suriris laŭ lia kompaso la mondmaron, dum submaraj ondegoj minacis fendi ĝin, akvomasoj ĝin frapegis k el ĉiuj direktoj ventegoj ĝin torturis.

La strukturo tamen pruviĝis esti taŭga por kontraŭstari ĉiajn sin kunigantajn al detruo elementojn. Ili povis deŝiri kelkajn negravaĵojn, sed la direktilo restis. La direktilistoj k la fidela ŝipanaro, kiuj fidis sian ŝipon k ĝian kapitanon, restis surŝipe. Nur la nelojaluloj, tiuj, kiuj ne kredis en la iama atingo de la celo, forlasis la, iliaopinie, subakviĝantan ŝipon por tamen mem perei en la maro, aŭ por transiri al alia laŭŝajne pli solida boato, kiu postulas malpli de iliaj povo k kapabloj.

Ĉiuj veloj estis hiŝataj, la breĉoj ŝtopataj.

Tiel la ŝipo de Lanti atingis plenforte sian dektrian ankrejon. Tie, en la Stokholma haveno, salutate entuziasme, K-do Lanti povis forlasi sian gvidpostenon por ĝin transdoni en aliajn manojn.

Tiel ni volus karakterizi SAT k Lanti, kiuj tiel firme interligiĝis. Memkompreneble estas, ke K-do Lanti kiel fondinto de SAT donis al ĝi la spiritan enhavon, devenintan el lia esperantisteco. Ĉar li havis grandan simpation por Zamenhof, la homo k kreinto de tiu lingvistika monumento esperanto, estas nemirige, ke ambaŭ kuniris tiome, kiome ili samopinias, ke ne sufiĉas propagandi esperanton simple kiel lingvon, sed ke ĝi bezonas animon, kiu havigos al la lingvo pli gravan funkcion k sekve tial vivpovon. Lerninte esperanton, li ne kontentiĝis per persona praktikado, sed serĉis fervore vojojn, kiuj kondukus al kiel eble plej vasta disvastigo, en la intereso k la servo de la proletaro. La atendita subteno de la laboristaj instancoj ne venis, k anstataŭ ricevi la helpon de Komintern, kiel li esperis, venis la sciigo, ke ĝi ne povas sin okupi pri tiaj aferoj. Pro ĝiaj bazo k strukturo oni ĉiuflanke suspektigis k malŝatigis SAT k ties gvidantaron ĉe instancoj, kiuj ne povas havi ideon pri la ebloj de esperanto, ĉar tiuj tute ne scias ion

pri tiu ĉi mondlingvo k ĝia valoro por la laborista movado.

Sciante, ke per aplikado de esperanto aliaj k pli taŭgaj vojoj povas esti surirataj, kiuj kondukas al mondsocialismo, Lanti ne lasis sin forpuŝi, k li plenumadis kiel laborista esperantisto sian taskon en la servo de la mondproletaro. Kiel organizo SAT akiris sian apartan signifon, same pro sia strukturo, kiu ebligas al siaj membroj plivastigi sian horizonton. Kiam SAT finfine propramaniere eluzos la nefacile akiritajn spertojn, esencigitajn per propraj ideoj, en la batalo por pli bona socio, por pli altgrada vivordo, k kun propra rigardo en la mondokazaĵoj, k ignorante limojn k naciojn, penas influi la disvolviĝon al tio, tiam oni ne faru riproĉojn al SAT aŭ ties gvidanto, sed al la laborista movado k ties gvidantaro en ĉiuj landoj, kiuj preterlasis konduki tiujn influhavajn ecojn en sia direkto. Dank' al tiu preterlaso la « sennacieca » asocio tutmonda, estante kultura organizo, povis fari pioniran laboron inter la esperantistoj. Kaj povis plivastiĝi la ideo pri la « sennaciismo ».

Al K-do Lanti ni dankas la instruon pri la tutmonda laborist-esperantomovado, pere de liaj spirita gvidado k verkaĵoj. Tiujn vortojn ni volas dediĉi al K-do Lanti ĉe lia foriro el la gvidado de SAT, kiun li tamen, ni esperu, ankoraŭ longe subtenos konsile k fare en ĝia peza tasko.



14-a Kongreso de SAT

en Valencio (Hispanio)

3.-8. aŭgusto 1934.

UNUA KOMUNIKO.

Kvankam nia rondo estas ankoraŭ malgranda k nova en la proletesperantista movado, tial ke ĝi tute ne ekzistis antaŭ nur kelka tempo k ni mem estas tre junaj k malspertaj, ni tamen kun granda ĝojo akceptis la organizadon de nia venonta Kongreso kun plenplena espero k konvinko, ke se ne mankas la subteno de ĉiuj lojalaj k fidelaj Gek-doj, ne pro tio nia XIV-a estos malpli brila k sukcesa ol la ĝisnunaj SAT-Kongresoj.

Kongreskomitato dividiĝas en tri fakojn : *Rilatoj*, *Propagando*, *Administro*, gvidatajn respektive de jenaj respondecaj K-doj : *R. Kiles*, *L. Hernandez* k *R. Palomares* k priservatajn de jena subkomitato : K-dino *Angelita Soler* k K-doj *A. Cortés*, *Fko. Marco*, *Fko. Moreno*, *J. Ventura* k *J. Santiago*. Ĝenerala servo : *Loka Grupo Laborista Esperantista.*

KONGRESKOTIZO : Interkonsente kun la Direkcio ni fiksis jenan unuecan kotizon :

10 pesetoj (egalas al 21 fr. fr., 2 guld., 5 sved. kr.)[1]

Monon sendu al SAT, aŭ al : *Francisco José Montesinos*, str. Rafol, 2-2º, *Valencia*. Kiu pagos al tiu adreso, bonv. sendi sian aliĝon al la Organiza Komitato de la 14-a SAT-Kongreso (str. Horno del Hospital, 12). Aliĝiloj sen samtempa pago estas nevalidaj. Ĉiuj aliĝintoj ricevos kongreskartojn. Ni petas vin por plifaciligi nian laboron, anonci vian partoprenon baldaŭ ; petu Aliĝilojn ĉe la O.K.K. aŭ via Peranto. Krome *Aliĝilo* enestos la *Jarlibron !*

Ni presigis grandan kvarkoloran murafiŝon tre artan pri la Kongreso, speciale taŭgan por grupoj. Ili estas haveblaj po 0.60 pesetoj por ekz-o (t.e. 1.25 fr.fr. aŭ 0.25 sv. fk. aŭ 1 resp. kupono). Ĉe mendo de pli ol 1 ekz-o ili kostas 0.50 ps. por ekz-o. Al Grupoj, sindikatoj k.s. ni liveros ilin senpage. Zorgu jam pri agentejo por la propagando de nia Kongreso.

[1] Ni konsentis pri tiu kotizo iom pli alta ol kutime, pro tio ke en Hispanio nia Asocio ankoraŭ ne estas tre firme enradikita k la O.K.K. faros kun la kongres-propagando samtempe sisteman propagandon por SAT en Hisp. — *Dir.*

Komuniko de la Direkcio

Elekto de Konflikt-Komisiono.

La K.K. estas elektita laŭstatute en kunveno de la Roterdama SAT-anaro de la 22. oktobro 1933. Kiel sciate, la XIII-a Kongreso komisiis al la Roterdamanoj starigi la K.K. en ilia urbo. Ili mem estis la proponintoj. En la unua kunveno de l'SAT-rondo ne ĉeestis la statute postulata nombro da K-doj, nome 2/3 (ĉeestis nur 39 el 88). La 22.10. la regula nombro, en ĉi tiu kazo la duono, estis atingita : ĉeestis 46 K-doj el 88 (do pli ol la duono).

Estas elektitaj en la K.K.-on jenaj tri K-doj : *Jan Bout* (15 396), inĝ. *B.B. de Regt* (18 456) k *Bas Wels* (17 668). Adreso de la sekretario : Jan Bout, Watergeusstr. 24, Rotterdam (W), Nederlando.

Ricevinte k kontrolinte la protokolon pri la elekta kunveno, ni konfirmas la regulecon de la elekto. La investitaj K-doj sekve rajtas funkcii de nun kiel K.K.-anoj.

Ni ĉiuj streĉu niajn fortojn por sukcesigi A.D.L.E.L.

— Ĉu vi scias legi ?
— Kia demando !
— Sed ĉu vi scias legi sufiĉe flue k senpene, por ĝui, ekzemple, ampleksan romanon en esperantlingva vesto ?

Multaj demanditoj eble fiksos sur vin iom ĉagrenan rigardon ; ili konfesos kun sincero, ke nur kun granda peno ili legas nian literaturon, eĉ belartajn verkojn, kiuj estas prezentitaj en formo de simpla rakonto aŭ romano.

La kaŭzo troviĝas kelkfoje en la speciala stilo de iu aŭtoro ; ne ĉiu verkisto kapablas vesti siajn pensojn en klaran formon. Sed plej ofte tamen ni serĉu la malsukceson en *manko de ekzerco* ĉe la leganto. Oni tre ofte emfazas pri la neceso multe paroligi la lernantojn en la grupoj k rondoj. Oni unuavice postulas de bona kursgvidanto, ke li kapabligu siajn kursanojn konversacii en esperanto. Sed mi konas ankaŭ esperantistojn, k cetere vi mem ankaŭ konas ilin (ili ne ĉiam estas izoluloj !), kiuj akiras la lingvon ununure per legado, per trastudado de libroj. Ili havigas al si unu libron post la alia, k se la unuajn ili legadas malfacile, la sekvantajn ili sorbas flue. Kaj kutime la lingvosento disvolviĝas tre forte ĉe tiuj studantoj ; ili ekregas la nuancojn de la lingvo k manipulas ĝin kun mirinda certo.

Nenia pli taŭga lingva perfektigilo ol bonstila libro ! Homoj multlegintaj, kiuj neniam antaŭe havis okazon paroli esperanton kun alia persono, praktikas la lingvon klare k senerare ĉe la unua okazo, kiu prezentiĝas al ili (post venko super la ordinara timosento, kiun ĉiu devas trapasi).

Unu el la celoj de SAT ankaŭ estas, akceli la kreadon de literaturo, spegulanta la idealon de la Asocio. Ekde sia ekzisto SAT eldonadis li-

brojn ; sed ili aperis neregule, sen ia ritmo, k plej ofte ne laŭ difinita plano. Per la starigo de la « Asocio por Disvastigo de Laborist-tendenca Esperanto-Literaturo » ni ĝuste volas fini tiun staton. Per A.D.L.E.L. la eldon-agado estu reguligita, laŭplana ; ĝi estu ritma ankaŭ k seninterrompa.

Oni rimarkis, ke en la lastaj jaroj la eldon-agado de SAT ne multe prosperis. La ĉefa kaŭzo kuŝis certe en la eksteraj okazintaĵoj : skismo kun ĝiaj malfortigaj sekvoj, ekonomia krizo, ktp. Sen tiaj okazoj sendube estus aperintaj pli multaj verkoj ĉe SAT en la lastaj jaroj, ĉar manuskriptoj ja ne mankas. Tamen, gravas ankaŭ, KIO estas aperigata ! Ne ĉiuj legaĵoj respondas al iuj bezonoj ĉe granda parto de la legantaro ! Kaj la longjara depono k treege malrapida disvendado de tiaj libroj ree estas malhelpo por plua eldonado...

La Literatura Sekcio de SAT, observinte la ritmon de disvendado de diversaj verkoj, konstatinte, ke ĝenerale belliteraturaj (beletraj) verkoj multe pli facile disvendiĝas ol sciencecaj, klerigaj k ofte tro abstraktaj legaĵoj, decidis sekve akcepti en la eldonplanon de A.D.L.E.L. nur belliteraturajn verkojn (precipe romanojn). Neniu kontraŭdiros, ke la enhavo de tiaj libroj multe pli konvenas por esperantisto, kiu ne ankoraŭ tre funde posedas la lingvon, ol scienceca, filozofia literaturo. Unuvorte, la Literatura Sekcio opiniis, ke la romano « Jimmy Higgins » de Sinkler aŭ « Kandid » de Volter estas pli volonte akceptataj de la SAT-anaj legantoj ol ekz. « Ŝtato k Revolucio » aŭ la « Komunista Manifesto », kiujn posedas multaj esperantistoj jam en nacia lingvo.

Kompreneble, per tio ne estu farita komparo pri la *kvalito* de la cititaj verkoj ! Kaj ankaŭ per tio ne estu dirite, ke de nun SAT okupos sin ekskluzive nur pri eldonado de beletra literaturo ! Tute ne. Lasante al A.D.L.E.L. tiun taskon provizi la legantojn esence per belliteraturaj verkoj laborist-tendencaj, SAT restas preta eldoni ankaŭ plue, paralele al tio, verkojn kun socipolitika, scienceca, filozofia, kleriga k eduka enhavoj. Se ekzemple la Socialista Frakcio el SAT-anoj preparas « Socialistan Antologion » kun elektitaj paĝoj de socialistaj eminentuloj, k proponas ĝin por eldono al SAT, nia Asocio certe eldonos ĝin same, kiel ĝis nun ĝi eldonis tiaspecajn verkojn, ordinare proponatajn de anoj de difinitaj tendencoj. Kiel lastdate ankoraŭ « Liberecana Socio » k « Komentoj al la Komunista Manifesto ». Kaj se aliaj K-doj proponas verkon pri Edukado aŭ pri Ekonomio, ni principe same akceptos ĝin por eldono ĉe SAT, kondiĉe ke la financa bazo por la eldono ekzistas.

Tiu eldonado okazu paralele k sendepende de A.D.L.E.L.

* * *

En la antaŭa n-o la legantoj trovis la kompletan ELDONPLANON por la unua serio de libroj, eldonotaj de A.D.L.E.L. en la jaro 1934. Ili aperos, se unu kondiĉo, ja unu *grava* kondiĉo, estos plenumita : se sufiĉe da K-doj (almenaŭ kvarcento) deklaris sian aliĝon al la entrepreno kun samtempa partopago de 20 fr. frankoj (4 svisaj frk.) ĝis la 15-a DE DECEMBRO. La sumo por la tuta jaro estas 50 fr. frk. (10 svis. fk.). — Ĉu la peto estas tro malmodera ?

Por tio vi bezonas nur kontroli la kvanton k la kvaliton de la libroj eldonotaj. Ja sume la K-doj ricevos legomaterialon el pli ol mil paĝoj dum unu sola jaro[1]. La libroj estos eldonataj en sufiĉe granda formato ; ili estos belaspektaj. Ni rimarku parenteze, ke, kiu deziras *binditajn* ekzemplerojn, tiu kompreneble devas krompagi ioman sumeton por tiu lukso. Pri la valoro de la enhavo garantias la titoloj k nomoj de aŭtoroj por la du unuaj verkoj ; per la aliaj, la originalaj, SAT deziras tute aparte firmigi sian reputacion, deziras elmontri, ke produktaj k kreaj fortoj ekzistas en ĝiaj vicoj.

Mi kredas, ke ne necesas plue insisti ĉe niaj amikoj pri la gravo k la signifo de ĉi tiu entrepreno. Laŭ leteroj ricevitaj ni jam povas juĝi, ke la starigo de A.D.L.E.L. trovis vastan eĥon k estas akceptita de la SAT-anaro kun entuziasmo. Restas do solvenda la buĝeta problemo, restas la ago de sufiĉe granda nombro da Gekdoj, kiuj per sia aliĝo k kotizo donos al la entrepreno la eblon ekfunkcii...

Kaj rilate tion mi havas la konvinkon, ke malgraŭ kriza tempo k multaj malhelpoj, en kiuj baraktas ĝenerale nia movado, la SAT-anoj estos sufiĉe konsciaj por sukcesigi definitive A.D.L.E.L. k ĝian eldonplanon. Mi havas tro da konfido en la sanan forton de nia movado, por ne antaŭvidi la sukceson de klopodoj, kiuj donos al la laborista esperantistaro k ĝia tutmonda asocio pli firman fundamenton k pli vastan disradiadon. Vivu A.D.L.E.L. ! *N.B.*

[1] Ni respondas al demandintoj, ke en la Skemo de l'*Eldonplano* troviĝas kalkul-eraro. Tamen *principe restos* 50 %-a *gajno por ADLEL-anoj*. Ni *modifos* ankoraŭ diversajn prezojn, sed la tarifo por ADLEL restos neŝanĝita.
La « Vortaro » partoprenas ja en la serio *nur per la procentaĵo*, kiu estis fiksita je 40 %. Sed tiu libro verŝajne estos pli ampleksa ol taksita en la Plano, k sekve la vendoprezo estos pli alta, dum la proporcia ŝparo por ADLEL-anoj estos pli granda. — *N. B.*

El niaj Leteroj

... no (Hitlerio), 7.9.33.

... Grupo aŭ rondo ĉi tie ne plu ekzistas. Ĉe nia peranto oni en aprilo traserĉis la loĝejon, ĉar li estis estro de laborista sportunuiĝo. Pro tio por li estis tre danĝere kunvenigi la SAT-anojn. La plej fidindaj el ĉiu el la antaŭaj grupoj renkontiĝas de tempo al tempo, nur por havi kontakton inter si. El la iama loka LEA-grupo oni enkarcerigis depost 10 semajnoj 3 funkciulojn. LEA-on oni konsideras ĉe la polico kiel filion de la K.P.G. Kelkfoje mi kiel estro de la loka S.E.A.-grupo devis iri al la polica prezidejo. Tie oni ĉiam volis scii, ĉu ni pritraktis politikajn aferojn en niaj kunvenoj, kion mi ĉiam neadis, k oni ne povis pruvi la malon... Esperanton la nunaj regantoj tute ne ŝatas. Oni verŝajne malpermesos instrui ĝin. Antaŭ monatoj estis arestita filo de iama SAT-ano ĉi tiea pro politikaj aferoj. Li skribis al sia patro, kun peto, okaze de vizito kunporti por li esp. lernolibron en la malliberejon, ĉar li havus nun multe da tempo k emo por ĝin lerni. La patro ĝoje alportis ĝin, sed en Hitlerio esp-o, kreita de judo, estas « negermanaĵo » k tial la deĵoranta policisto malpermesis transdoni la esp. lernolibron. Li diris : « Estas malpermesate lerni tiun lingvon. Kiu ĝis nun scipovas la lingvon, tiu scipovas ĝin, sed instrui ĝin al iu nuntempe estas malpermesata. »... Pli valore ili taksas instrui al lernejaj infanoj la uzadon de l'gasmasko. Tion en nia urbo oni lernigas nun al 10-14 jaraj infanoj en la lernejo. La geinstruistoj devas esti salutataj de la lern-infanoj *en* k *ekster* la lernejo per « Hajl Hitler ! » k braklevo. 12-14-jaraj knaboj, kiuj vizitas duagradan lernejon, estas vere militiste ekzercataj en arbaro aŭ sur soldatekzercejo... Mi vin petas, estonte kiel ĝis nun esti ĉiam tre singardemaj en evtl. skribaĵo al germ. K-doj por ne endanĝerigi ilin...

AŜ, 30.7.33.

... Pasintjare mi skribis kelkajn artikoletojn por « Internaciisto », ĉar tiam mi estis membro de IPE. La 1-an de decembro lastjare nia grupo kolektive aliĝis al LLE (Lab. Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakio). Pere de la legado de « S-ulo » ni estis informitaj, ke SAT ne estas tia krima internacio, kian « I-sto » ĉiam indikis. Mi devas konfesi, ke iam mi estis fanatika komunisto, sed ne plu. Socialdemokrato mi ne povas fariĝi (k ĉefe, ĉar SAT estis kalumniita kiel socialdemokrata organizo, mi ne jam pli frue aliĝis) ; kio restas ? La fondo de ISE en Vieno tre okul-

rape montris, ke SAT ne estas tia, kia priskribita, sed ke ĝi aspiras la solan ireblan vojon por la proletaro...

18. 612.

« ... London W.12, 15.IX.33.

« ... Mi ŝatus aboni la Revuon, sed ne povas aboni la *duon*. Tial mi aniĝos al SAT kun « S-ulo ». Iel, ne povas esperantisto nun esti neŭtralano post la 25-a Kongreso. Dio mia, oni diras min, ke ili kantis himnojn al Hitler !... Via frate *R. J. Kerr* (Esp-isto 10.394 en la Adresaro de L.L. Zamenhof, 1904). »

Jen ekzemplo imitinda de multaj aliaj, kiuj ĝis nun membriĝas ĉe « neŭtralaj » organizoj, kvankam ilia ĝusta loko estas en SAT ! Bonvenon ni deziras en niaj vicoj al K-do Kerr, tre malnova esperantisto, kiu kuraĝe venas al ni, estante verŝajne la plej maljuna SAT-ano : li estas 83-jaraĝa !

...go (Hitl.), 14.10.33.

... dank'al la *mal*disvastiĝo de la lingvo inter la poŝtoficistaro k precipe cenzuristaro mi ĝis nun bonorde k regule ricevis « S-ulo » n k « S. R. ».

... Supozante, ke la faŝista partio germ. estas konstante informata pri la stato en Aŭstrio k sekve jam hodiaŭ preparas ĝian anekson, kiel oni povas konstati per la paroladoj k gazetartikoloj pri la aŭstria demando, mi ege malaprobas la kontraŭaĵojn de niaj tieaj Gek-doj[1]. Nia k la ekzemplo de la itala laboristaro devus ilin averti k apelacii ilian sanan prudenton. La ideo reprezentita en SAT, pere de nia lingvo konduki mondskale la batalon kontraŭ la naciigo de la popoloj, neniam devas iĝi ludilo en la manoj de ambiciaj laboristoj sin nomantaj esp-istoj. Dum ĉiuj internacioj malfunkciis, SAT ne perdis la interligon. Oni lernu el ĉi tio...

SEMOJ EKĜERMAS

Kiel multaj legantoj eble jam scias, la Nacia Konsilantaro de Labor-Kolegioj *(National Council of Labour Colleges) eldonas jam de pluraj jaroj gravan monatan revuon* La Plebo *(The Plebs). En la septembra n-ro troviĝas artikolo de Eden k Cedar Paŭl, en kiu la du geaŭtoroj rekomendas tute speciale al la legantoj la studadon de ses libroj. Certe la SAT-anoj ekscios kun intereso, ke el tiuj ses du rilatas al esperanto k precipe al sennaciismo.*

La aŭtoroj unue diras, ke: « La lab. movado estas senefika, se ĝi ne prepariĝas por esti la plej potenca el la akuŝistoj de la revolucio », ĉar la edukado estas: « La majstra teksisto ĉe la teksilo de l'tempo ».

Sed sen plia komento ni simple citu la finan parton de la artikolo, kies titolo estas: Politika penso k praktiko :

« Ĉu eblas, ke la laborist-klasa movado faru efektivan progreson, se ĝi ne anstataŭas sian ŝajnan internaciismon per iu vera kosmopolitismo aŭ sennaciismo ? Ĉu iu internacia lingvo — pli bone, sennacieca lingvo — ne necesas por la sennaciigado ? Dum ni skribas, la dek-tria kongreso de la klaskoncsiaj esperantistoj, de *Sennacieca Asocio Tutmonda*, okazas en Stokholmo. Ni ne kategorie asertas, ke esperanto povas ludi, k pli bone ludi, la unuigan rolon, kiun ludis la latina lingvo dum mil jaroj, nek ke ĝi ankaŭ povas doni al la laborista movado la viglon aŭ la skuon, kiuj hodiaŭ estas tiom videble necesaj. Sed eble tio povas esti ; k la regantoj de Sovetio ŝajnas al ni tute ne klarvidaj, pro tio, ke ili turnis la dorson al esperanto. *La Manifeste des Anationalistes*[1] ĝis nun ne publikiĝis en la angla lingvo, sed ĝia traduko estas preta. La *Nacia Konsilantaro de Labor-kolegioj* prave agus, alprenante ĝin kiel suplementon al *The Workers' Esperanto Movement*[2] verkita de Lanti. Eble ĉi tiuj du broŝuroj enkorpigas unu el la plej gravaj « politikaj pensoj » de la mondo, kiuj nun fariĝas. »

Sennaciisto.

[1] Koncernas al ALLE k ISE.

[1] Temas pri la franclingva eldono de tiu bone konata esperantlingva verketo.

[2] Temas pri la anglalingva eldono de « La Laborista Esperantismo ».

Propagando en Usono

Por-esperanta artikolo de Dana Slit (Sleeth) aperis en septembro en « Seattle Star », « Tacoma Times », « Spokane Press », « Boise Capital News », « Portland New Telegram », « Los Angeles Record » k en pli malgrandaj gazetoj en Kalifornio k Juta (Utah). La kuna cirkulado estas inter 450.000 k duona miliono da abonantoj k eble unu miliono da legantoj.

El la tricentvorta artikolo, kiu aperis en la 3-a n-o el « Nia Bulteno » (Los Angeles) pli ol 2000-ekzemplere k estis dissendata al pli ol 40 usonaj ŝtatoj, ni citas : « ... Esp-o estas agnoskita k hodiaŭ ne nur flankokupo aŭ ludilo de kelkaj stranguloj... La afero de tiuj, kiuj estras la mondon, ĉiam estis havi internaciajn lingvojn por diplomatio, kiujn ĉiuj mastroj komprenis, sed kiuj estis nekonataj de la amaso. Kiam la plimulto el la tutmonda popolo parolos k skribos la saman lingvon, la aferstato ŝanĝiĝos — por kiu benata idealo mi donas al esp-o mian malfortan antaŭenpuŝon. »

Malnovaj legantoj rememoros tradukon en la n-o 376-77 el « S-ulo » sub la titolo « Ies Opinio » k ankaŭ la kritikon, kiu sekvis en n-o 383. Ambaŭ n-oj estis sendataj al Dana Slit, kiel ankoraŭ aliaj poste. La esp-istaro notu, ke multaj miloj da malriĉaj homoj aĉetas la gazetojn ĉefe por legi la dirojn de Dana Slit.

La verda stelo en Hitlerio

Okazintaĵon, kiu verdire ne estas unuopa en sia speco hodiaŭ en Germanio, rakontas al ni nederlanda K-do, kiu travojaĝis la Trian regnon por iri Stokholmon :

Mi trankvile transpasis la limon, k nek doganisto nek S. A.-viro[2] ĝenis min. Sed mi ĝojis tro frue. Pro vagonarŝanĝo mi devis atendi tri horojn, kiun tempon mi utiligis por promeni en la proksimo de l'stacio. Post 20 paŝoj helppolicano haltigis k intervjuis min pro la kvinpinta stelo sur mia brusto. Rimarkante, ke mi ne komprenas germanan lingvon, li koleriĝis k suspektis min kiel komunistan kurieron. Li deziris malfermi sur la strato mian kofron. Sed tion mi ne permesis, k mi troviĝis baldaŭ en tielnomata helpkazerno de S.A. Sed jam en la atendejo mi postulis laŭte, ke oni permesu al mi interrilati kun la holanda konsulo. Tiuj vortoj faris iom da impreso. Oni postulis mian pasporton k forprenis el la kofro gazetojn, notojn k vortaron esperantlingvajn. Du horojn daŭris la esplorado, ĝis mi povis daŭrigi la vojaĝon, tamen lasante en la manoj de la polico la esperantaĵojn.

Petro el Mevurbo (16 794).

Kie mankas esperanto

Pri la malfermo de la kontraŭproceso, okazinta en Londono por verdikti senpartiece pri la veraj kulpuloj en la ekbruligo al la germana regna parlamento, ni legas en Pariza tagmeza ĵurnalo jenon : « Kiom ajn impresa estas ĉi tiu proceso, senprecedenca sendube en la juĝafera historio, oni devas tamen rekoni, ke al la malferma kunsido mankis iom da digno. Sendube kaŭzis tion manko de organizo k trorapido en la preparoj... Tiel, ĉar oni ne havigis al si kompetentulojn de lingva vidpunkto, la pli multaj deklaroj estis malbone interpretitaj k povis esti netigataj laŭ sia vera senco nur dank' al iom kakofonia[1] helpado de l'ĉeestantaro ». Ĉu tia fakto, centfoje ripetiĝanta, ne meditigos fine la internacian publikon k precipe la laboristajn gvidinstancojn pri la nepra neceso de internacia lingvo ?

Al niaj perantoj !

Kelkaj el vi ege komplikas nian laboron k certe ankaŭ... vian propran! De nun vi faru tiel, ke viaj pagoj (poŝtĝiroj, bankĉekoj, monbiletoj ktp) estu paralelaj kun viaj kotiz-, abon- k mendo-listoj. Viaj pagoj kovru tute unu aŭ plurajn listojn, sed neniam parton el unu. Se vi ne sendas monon samtempe kun listo, vi nepre skribu ĉe la fino « inkluzive ĉi tiun liston, mi ŝuldas tiom por kotizoj aktivaj, tiom por abonoj al S.R., tiom por libro-mendoj, tiom por ADLEL, ktp. ». Krome, vi prefere ne prokrastu la pagon, ĉar manko de tiu « substanco » domaĝas al nia afero !

Ni ŝatus ankaŭ, ke vi formu zorge la literojn de la adresoj (pri la konsekvencoj de tiuj neintencitaj fuŝoj, fare de vi, ni ne volas respondeci) k ke vi citu, laŭeble k laŭkaze, la membromatrikulon.

Vi ne povas imagi, kiel tiu metodo simpligos nian k vian taskon. Vi ne forgesu, ke preskaŭ la tutan administradon ni plenumas post nia panakira ofico ekster SAT.

La Sekretario de SAT.

[1] Malbonsona.

[2] Ano de Hitleraj specialtrupoj.

Diskutejo

SKOLTA NEŬTRALISMO

(Respondo al K-do 17.265)

Kion mi intencis montri, kiam mi ekskribis pri « skolta neŭtralismo », estis antaŭ ĉio, ke la movado laŭ miaj spertoj k la ĝenerala prudento tute ne estas tielnomata neŭtrala, sed pure burĝa, ne nur laŭaspekte, sed ĝisfunde. Ke ekzistas K-doj, kiuj havas alian opinion, iomete surprizas min. Ke mia artikoleto ŝajnas al K-do 17.265 nur la duona vero, igas min protesti, ĉar ĉiu parteto de ĝi estas bazita sur faktoj.

Antaŭ nelonge aperis libro en Danio pri skolta movado, ĉefe verkita de Baden Povel (Titolo : *En kavalira agado*). Kaj jam en la recenzo pri ĝi oni povis legi jenan ĝojigan konstaton de konata konservativa kuracisto : « La skolta movado forigas la klaskonscion de pli fruaj tempoj. » (Vere bona organizo por laborista junularo !) Plue oni legas en la libro ekz. pri riĉuloj k malriĉuloj : « Riĉulo povas posedi, ĉu 2-3, ĉu pliajn domojn, sed li ja nur povas esti en unu el ili ĉiufoje, ĉar li ja posedas nur unu korpon, do li tiurilate ne estas pli feliĉa ol la malriĉulo ! »

Laŭ la filozofio de B.P. estas du ŝlosiloj por la malriĉulo atingi la saman spiritostaton kiel la milionulo (!) : 1. Ne multe aŭ tro serioze pensi pri la okazaĵoj ; 2. Esti afabla al ĉio k ĉiuj.

Al tio nenecesas komentoj, ankaŭ ne kiam « la ĉefo » klarigas la demandon pri la posedrajto jene : « Se vi posedas dentbroson k pantalonon, k unu el viaj K-doj ne — kion fari ? » (Jen la solvo pri la granda demando : krizo aŭ plano, malriĉo k riĉo !) Ankaŭ en la libro oni estas instruata pri *strikoj*. B. P. rakontas, ke li dum striko parolis kun maŝinisto, kiu laboradis spite la ĝenerala laborhalto, k demandinte, kial li funkcias kiel strikrompanto, tiu respondis « kun pardonebla fiero » : « Rigardu ĉi tiun laboron ! Ĉu ĝi ne ŝajnas al vi rava ? Mi ne povas iri for de ĝi ». Do, pro amo al la laboro, skoltoj, fariĝu strikrompantoj k perfidu viajn klask-dojn !

La rilato al *virinoj* estas priskribata : Oni devas nur rigardi la belajn flankojn (partojn) de la virino, ŝiajn sentojn, intelekton ktp, ne lasi sin « delogi » de ŝi, resti « pura », t.e. virta ktp, do io tute nenatura, nefarebla k nenormaliga. Laŭ *religio* oni devas aparteni al la burĝa eklezio, kredi je ĉiuj dogmoj pri Dio, Jesuo, Sankta Spirito, Sankta Virgulino kc. Da tiaj aferaĉoj la libro estas plena. Bona k rekomendinda legaĵo por proletdevenaj infanoj k gejunuloj !

Kdo 17 265 skribas, ke ne dependas de la altrangaj gvidantoj, ĉu tiu, ĉu alia devizo estas uzata de skolta grupo, la spirito tie estas kiel tiu de la lokaj trupestroj, Tiu aserto memorigas min pri ekspoziciego, kiun la danaj skoltoj iam starigis en Kopenhago. *Oni fondis ĝin k akcentis ĝin tute militisma* k kiam la publiko plendis, la « altrangaj gvidantoj » rapidis senkulpigi sin, pretekste, ke la respondecon pri tio havas la lokaj trupestroj ! Diru al mi, kara K-do, kial oni do havas... « altrangajn gvidantojn » ?

« Ĉiuj skoltoj deziras povi kiel B. P., kiam ili fariĝos sepdekjaraj... » Bone, tre bone. Estas eble, ke la skoltgeneralo estas persone simpatia, honesta, klera, populara ktp. Tamen li estas k restos en proleta imago la spiono k la generalo, militisto, konservativulo, rojalisto (Memoru, ke la angla reĝo ja kunhelpis la fondon de la movado !) — homo, kiun laboristo nur iomete klaskonscia ne povas ŝati.

Kdo 17 265 ankaŭ citas laŭ B. P. : « *Sindonemo k servemo peras la ideon pri tutmonda paco, k ĉiu skolto estas frato al alia skolto, neatentante landon, rason aŭ klason.* » Kiam oni estas proleto, ŝajnas strange agnoski k kredi, ke mondpaco estus atingebla per sento de frateco. Ĉiu scias, ke same longe kiel limoj, lingvoj, nacioj, kutimoj, antaŭjuĝoj ktp. baros — same longe malpaco regos la mondon. Kaj ankaŭ ĉiu scias, ke precipe la skoltoj konservas tiujn instituciojn, konsiderante ilin kiel ion belegan, sanktan. (Sufiĉas legi la raportojn pri la jamboreo en Hungario, ekz. « Heroldo » n-ro 31 ! !).

« Vana krio » mia raporteto ne estis, nek estos. Se estas tiel, ke la laboristoj, eĉ SAT-anoj, nur fidas pri la « frateco » inter la membroj de burĝa mondorganizo k tute ignoras la proletajn organizojn por la junularo — mi estas konvinkita, ke estas bezonaj ankoraŭ multaj raportoj k senvualigoj. En Nederlando estas proleta movado por la junularo. « Ruĝaj skoltoj » aŭ « falkoj » oni nomas ilin. Same en Danio oni plurjare havis propran movadon por la junularo, kiu plene anstataŭas ĉiun skoltmovadon. En multaj aliaj landoj laŭ mi tiaj ekzistas (la nombro da anoj al S.J.I. (Soc. Junulara Internacio) estas pli ol kvaron-miliono), do ne ekzistas kialo membriĝi en burĝa (skolta) internacio ; pli trafe estus plifortigi sian propran organizon, starigi sekciojn, kie tiaj ne ekzistas, imiti la skoltan laboron, escepte la burĝajn k militistajn elementojn, aranĝi tendarojn, naturludojn, primitivan sporton ktp. Ke laboristoj povas efiki la aspekton k labormanieron de burĝa organizo, estas afero, pri kiu K-do 17.265 tute pravas. Kaj kie ne ekzistas k ankaŭ ne estas ebloj por starigi propran lab. sekcion, tio estas, kompreneble, farenda. Sed alirilate ne ŝajnas al mi laŭ proleta spirito sendi siajn infanojn en organizon, kies celoj estas parte naivaj, parte reakciaj k entute negravaj por la proletaro. Organizo, kies membroj estas *ĉefe* burĝidoj (k ĉu proletido fartas bone inter milionulidoj ? !).

Ke la skolt-asocio helpus la « patrion » k batalus kontraŭ siaj alilandaj « fratoj » militokaze, estas afero, pri kiu mi ne dubas. Oni ja preparas k edukas la infanojn tiucele ; certe *ĉiu skolto* estus preta, sed, kara K-do 17 265, mi dubas, ke ĉiu SAT-ano aŭ pacisto kunhelpus. Singardu viajn esprimojn !

Rilate la skoltmovadon ne ŝajnas al mi konfuzo. Mi diras, konvinkite pri la pravo de miaj vortoj, jenon al ĉiuj lab. gepatroj : « Lasu la burĝojn k iliajn idojn solaj kun ilia « neŭtralismo ». Ni ne bezonas ilian « fratecon » k burĝan ideologion. Al *niaj* infanoj ni ne deziras inokuli ŝovinismon, religion, faŝismon aŭ klasan konfuzon. Logike ni sendas niajn infanojn al la proletaj junular-asocioj k se tiaj ne ekzistas, ni fondu ilin ! Neniam plu ni toleros tian neŭtralismon, kiu hontigas k mokas niajn plej belajn idealojn. »

P. Thorsen (18.334), Grõnnegade 3, *Hillerõd* (Danio).

Ne forgesu mendi la oktobran k novembran kajerojn de

SENNACIECA REVUO

(se vi ne estas jam abonanto)
kiuj entenas valorajn raportojn pri la lab. situacio en la mondo !

Unuopa kajero : fr. fr. 2.50.
Jarabono 25 fr. frankoj.

SAT, 23, rue Boyer, Paris 20.

Por Ŝtopi la Breĉon

26. listo

SAT-anaro de Malmõ (pere de Lanti)	5 sv. kr. 5
Muri,	5 kr. n.
Restmono de nederl. aŭtobusa grupo al Stokh. (Veenendaal)	27 gd.
K-do Vigier (18 069), Valence d'Agen	5.20 fr. fr.
Memore pri A. Ozere k S. Gallo	10 angl. ŝil.
Ulo	4.25 fr. fr.

Recenzejo

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

JOH. MOST : LA DIA PESTO. El la germ. trad. *Seman Tarano*. 1932. Eld. D-ro Tobias Sigel, 2916, E. Grand Bould., *Detroit* (Mich.), Usono. Senpage por ĉiuj *sinceraj* dezirantoj. 23 pĝ. Form. 9 × 15 cm.

« El ĉiuj spiritmalsanoj, kiujn « la homo dum sia malluma vagado » sisteme inokuladis en sian kranion, la dia pesto estas la plej terura. » Tiel komenciĝas tiu trafa ateista broŝureto, kiu elmontras laŭ satira maniero k el materialista vidpunkto la sensencecon de l'kristanaj dogmoj. La traduklingvo estas flua k senerara.

SELMA LAGERLÕF : LA MONO DE SINJORO ARNE. Trad. *Stellan Engholm*. Eld. Societo Esperanto, Stockholm I. 110 pĝ. Prezo : broŝ. sv. kr. 1.50.

INTERNACIA CENTRA KOMITATO DE LA ESP. MOVADO : DUDEKKVARA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. (Paris, 30.7.-6.8.1932). Oficiala Protokolo, raporto k statistikoj. Raportaro de la oficialaj instancoj al la kongreso. 132 pĝ. Form. 15 × 22. Prezo ne indikita.

BUKEDO. Elektitaj rakontoj, skribitaj en esp. stenografio Duployé-Flageul. 16 p. Form. 10,5 × 16. Prezo : 1.50 fr. (esp. kupono). Eld. de Esp. Stenografio, 9, Bd. Voltaire, *Issy-les-Moulineaux*, Seine, Francio.

SANTANDER. Teritorio, historio, kutimoj, monumentoj k.c. Aranĝita, tradukita k verkita de *Julio Mangada Rosenõrn*. Eld. Hispana Esp. Asocio dank' al monhelpo de la Nacia Patronaro por Turismo, Madrid. 1933. 128 pĝ. Form. 13 × 19. Prezo ne indikita.

Jen belega gvidlibro kun multaj ilustroj, reprodukto de popolkantoj ktp., kiu konatigas nin laŭ agrabla maniero kun regiono en Hispanio. Estas atentinda propaganda faktoro, ke oficiala institucio ebligis tiun eldonon.

VALENCIA. Multkolora prospekto, kun malmulta teksto, nur bildmaterialo. Sama eldonejo.

UNUA SLOVAKA KRISTANA PRINCO. Pro milcent-jara datreveno de konstruo de unua kristana preĝejo en ĉeĥoslovaka teritorio laŭ verko de d-ro J. Hodal kompilis k trad. *St. Kamaryt*. Eld. Komitato de Pribina-festoj en Nitra. Havebla ĉe Slovaka porfremdula Asocio en Bratislava (Hotelo Savoy). 16 pĝ. Form. 11 × 14,5. Titolbildo.

SUPLEMENTO AL PROSPEKTO de Mnemonika Instituto de *D. Fajnŝtejn* (Zawalna 15-11, *Vilno*, Polio). Metodo de memorfortigo trifoje premiita de la Pariza Adakemio. Entenas rekomendajn leterojn k recenzojn pri la metodo.

NEOGLIFOJ. La monda skribo de D-ro *Alex. Sommer Batek, Praha-Liboc* 162. Prezo : 5 kr. ĉ. aŭ 2 resp. kuponoj. Laŭ la aŭtoro tiu « skribo » pretendas esti helpanto de la mondlingvo. Ĝi esprimas ĉiujn ideojn k frazojn per bildetoj.

La Komentoj al la Komunista Manifesto

kiuj ĵus aperis ĉe SAT (la verketo estas kompilita de K-do *Veder* laŭ anglalingva materialo)
estas utila kompletigo al la fama verko de Marks k Engels.
56 paĝoj. Prezo : 3.60 fr. fr.
SAT, 23, rue Boyer, Paris 20.

Jarlibro.

Ni admonas la K-dojn, ke nepre urĝe ili komuniku al ni *Perantadresojn* en tiaj urboj, precipe grandaj, kie ne jam ekzistas Peranto (ekz. en Lisbono, Vieno). La datlimo principe estas la 1-a de decembro.

Tra la Esperanta Gazetaro

Kiel sukcesigi niajn kursojn ?

En « Proleta Voĉo » (14-15), la gazeto de Iber-amerika LEA, ni legas, ke la kursgvidantaj K-doj (« profesoroj » ili nomiĝas tute erare, ĉar la vorto « profesoro » havas sufiĉe mallarĝan sencon en esp-o, kontraŭe al tiu en la franca k.a. lingvoj !) iniciatas starigon de Lernant-komitato (evidente laŭ soveta modelo) : «Pere de la « Lernant-Komitato » oni malaperigas la burĝan koncepton, ke instruanto estas supera hierarĥio, k samtempe metas en la junproletaj vicoj organizan principon. La lernant-komitato, semajnon post la malfermo de la kurso (laŭ cirkonstancoj), estas elektita de la lernantoj partoprenantaj en la kurso. Ili sin sentas fieraj k partoprenas en ĝi ĝis la fino... » Ni ne scias, ĉu la sukceso de kurso estas esence influata de la starigo de tiaj komitatoj. Sed provinda estas la afero eble ankaŭ aliloke ol en Hispanio, se... la instruanto opinias per tio povi atingi pli bonan kontakton kun siaj lernantoj !

Reakciuloj !

En « Bulteno de Ĉeĥoslov. Esp. Asocio » (n-o 4) ni legas jenon : « 22.IX. prezidanto de la Klubo s-o Ŝustr parolas pri Cionista kongreso, kiu antaŭ nelonge okazis en Praha. Li komparas ĝin kun kongresoj esp-aj... k riproĉas hebreajn esp-istojn, ke ili nenion faris por propagando de esp-o inter hebreoj dum la cionista kongreso. Sekvis vigla debato, dum kiu s-o Weisskopf detale klarigis div. demandojn k riproĉon de s-o Ŝustr, dirante, ke *hebreoj propagandas nun inter hebreoj sian hebrean lingvon, kiu estos ilia nacia lingvo. Estus do malfacile propagandi al ili iun plian lingvon nun, kiam ili ne ĉiuj ankoraŭ parolas la hebrean.* » (! Substreko nia.)

La katolika politiko.

En la « Progreso », Prago (n-o 4), ni legas jenon : « Germana Ligo de Katolikaj Esp-istoj (landligo de IKUE) malkovris simpatiojn por la naciismo. En dulingva cirkulero pri « La senco de la nacia revolucio » *ĝi flatas k defendas la novan reĝimon* k kritikas la antaŭan kondamnon de la nacisocialismo per la germanaj episkopoj ». Senkomente !

Kamaradaĵoj.

En « La Socialisto » (nov.) Vajnhengst unu-flanke deziras bonvenon k « socialistan kamaradecon » al tiuj, kiuj volas kunmarŝi kun ISE, sed samspire li elblovas sian ĉagrenon pri la brila sukceso de la Stokholma SAT-kongreso per dukolona furioza polemikado, en kiu tono de soc. kamaradeco absolute forestas. Ni ne ankoraŭ konis tiel malbonhumore la lirikan poeton H. V., kiu scias kelkfoje tre dolĉe agordi sian liron ! Nu, ni bone komprenas, ke la reantaŭeniro de SAT k la deklaro de ĝia Socialista Frakcio ne konformas al la plano de l'skismuloj...

(Daŭrigota.)

Memornoto

REPRESIS EL « S.R. » : *De Vrijdenker, Amsterd.* n-o 42 (Patrineco de Baĉo).

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS : *Arbetaren*, Stokh., 6.10., *Signalen*, Stokh., 12., 19., 26. 10., 2. 11., *L'Effort*, Lyon, 30.9., *Le Semeur de Nanterre*, 8. 10., *La Solidarité*, Genève, 23.9., *Skaraborgaren*, Falköping, 18.10., *La Revue Anarchiste*, Paris, okt. (memore al Gek-doj Ozere), *De Fakkel*, Amsterd., 24., 31.10. (kun la rezolucio de l'Soc. Frakcio), 3.,7.11., *Le Rappel de l'Aube*, Troyes, sept., okt.

Por Kursoj de Progresintoj

la plej taŭga libro estas

UNUA LEGOLIBRO

Sat-eldono. Ilustrita.

104 pĝ. Prezo : 6 fr. fr.

SAT, 23, *rue Boyer, Paris* 20.

Ekster nia movado

Fidela uzanto de esp-o, la Lyona Foiro, preparante la propagandon por sia venonta kunveno (8-18. marto 1934) ĵus eldonis novajn presaĵojn en esp-o (afiŝojn, sorbpaperojn, ilustr. PK k sigelmarkojn). Ĝi dissendos post unu monato presitajn invitleterojn en esp-o. Fine la katalogo de l'ekspozantoj entenos, kiel kutime, esp. tradukon de la ĉapitrotitoloj. Adreso : *R. Levin*, Foire de Lyon, rue Ménestrier, *Lyon*.

La Esp.-unuiĝo de saksaj geinstruistoj (iam, ho ! tiel pacisma !) aperigas « en la servo de l'propagando » (nacisocialista, kompreneble) bultenon « La Nova Germanlando ». La unua n-o estas dissendita eksterlanden 10.000-ekz-e ; samkvante estas presita Nuremberga parolado de Hitler.

Insbruko (Innsbruck), la urbo de la fremduloj, nun ankaŭ nomis straton laŭ d-ro Zamenhof. La loka Laborista Ĉambro aranĝas nunjare esp. kurson.

La « Turista Klubo de Portugalio » instalis en sia oficejo esperantan fakon.

Nova ĉepoŝta sukceso : La Brazila Departemento de Poŝto k Telegrafo eldonis oficialajn poŝtkartojn kun esperanta teksto.

NIA POŜTO

16 458. — Ni volonte publikigos vian artikolon ; sed neeble en « S-ulo » pro ĝia 6-paĝeco k abundo da neprokrastebla materialo. En venonta « S.R. ».

Radio-programo

25.XI : 15.45-16.00 Tour Eiffel, 1445 m, turismo (*same:* 2.XII.). 17.15-17.25 Brno, 342 m, parolado kun muziko (*same:* 2.12.). 22.07-22.35 Leningrad, 1304 m, pri Majakovski (*same:* 2.XII.).

26.XI. : 13.00-13.30, Karlskrona, 196 m, parolado.

29.XI : 22.05-22.20, Wien 517 m, k relajoj, informoj.

3.XII : 10.10-10.30, Stokholmo, 435 m, Motala k relajoj : Kiel esp-isto tra Eŭropo.

Socialistoj !

Ni intencas dediĉi la ĉefan parton de nia ĉiumonata « Esperanto-Paĝo » en « l'Etudiant Socialiste » (gazeto de la franclingvaj socialistaj studentoj) al peresperanta rubriko :

Ni petas, ke niaj ĉiulandaj socialistaj K-doj *sendu al ni materialon por tiu paĝo* (raportojn pri nia movado soc. k esperantista, informojn, proponojn, korespond petojn, k.t.p.) *Gravas !*

Poiraudeau, (sekretario de la Socialista Komisiono de FEO k de la Esperanta Komisiono de la franclingvaj Socialistaj Studentoj) en *le Tallud, par Mouilleron, Vendée (Francio)*.

Tramista Esperantistaro en Stokholmo intencas starigi ekspozicion, ampleksanta informojn pri trafiko per tramoj k aŭtobusoj en aliaj landoj. Tiucele ni insiste petas tramistajn Kamaradojn sendi al ni bildojn de tramoj k aŭtobusoj, de teknikaj detaloj, tram- k aŭtobusbiletojn, deĵordividojn, kolektivkontrakton ktp. Ni jam pretigis similan materialon por tuja rekompenco.

Sendu al : K-do Gunnar Gustavsson Hägerstensvägen 138, *Stockholm* 9 Svedio

Eŭropaj filatelistoj, atentu! K-do *Joh. H. Marsé*, Schutterstr. 14, *Leiden* (Nederlando), dez. interŝ. grandajn kvantojn da PM, 100-1000 pecoj. Se eble ankaŭ po kg. Ankaŭ laŭ mankolisto. Resp. garantiata. Mi ne sendas unue.

Biblioteko tuta por prezo liliputa: ADLEL.

Korespondado

DANIO.

K-do *Jens Olsen*, 24-jara, Lerchesgade 14, *Odense*, kĉl, pĉt.

FRANCIO.

Socialista junularo Bourget, 25, rue Parmentier, *Drancy* (Seine), dez. kor. pĉt. kĉl. Certa respondo.

HISPANIO.

Esperanto-Grupo Universala Frateco, Paseo Fabra Puig 35, *Barcelono* (S.A.), pri ĉt. Resp. gar.

NEDERLANDO.

Lab. Esp. Klubo « Frateco » dez. kor. kun eksterl. K-doj pĉt. Resp. gar. Interŝ. PM. Skribu al *H. F. W. Scholten*, Hoekenessestr, 46, *Dordrecht*,

K-do *W. Stapel*, lokomotivisto, v. Guerickestr. 98 hs. *Amsterdam-O. dez* kor kun samfakulo en norda parto de Francio. Resp. gar.

20-j. fraŭlo, libropresisto, soc. lab. sportligano, dez. kor. kĉ. Resp. gar. K-do *H. E. Vreulink Vijfhuizen* (Haarlemmermeer).

K-do *Wim van Vuuren*, Sparrenstr. 36, *Haarlem*, lab. sportligano, dez. kor. kĉl. Gek-doj, pĉt, resp. gar.

SVEDIO.

Esp. grupo en Mörarp aranĝos let. -vesperen la 10. jan. Sendu PK, L ktp al *Arvid Blomkvist*, *Mörarp*. Resp. garantiata.

Du 20-j. fraŭloj dez. kor. kun Gek-doj el ĉl. K-do *Harry Pettersson*, Viktoriag. 5, *Västerås*, k K-do Erik Lundkvist, Hemdal 96, *Västerås*.

Atentu !

Al ĉi tiu numero estas aldonita la Tarifo por 1934 kiel aparta prospekto. Bonvolu utiligi ĝin por via propra informo k aukaŭ montri ĝin al viaj esperantistaj konatuloj. Komenciĝis jam la varbotempo par la Asocio ! Ni petas vin ne tro longe prokrasti la repagadon de la kotizoj k abonoj, por ke ni sen troaj malfaciloj povu plenumi en la Administrejo la jarkomencan laboron. Kiu volas seninterrompe ricevadi siajn gazetojn k ĝustatempe posedi la novan Jarlibron, tiu pagu laŭeble jam antaŭ la jarfino, sed almenaŭ ne pli malfrue ol en la unua duono de januaro. Superŝutu nin per re-aliĝoj k per nov-aliĝoj. Ĉiu nova membro, ĉiu nova abonanto plifortigas nian agokapablon ! Ĉiu membro faru sian SAT-anan devon !

Kiu volas konatiĝi kun la ideoj k la pensado de la gvidinto de SAT, tiu havigu al si nepre la verkon:

VORTOJ DE KAMARADO E. LANTI

190 paĝoj. Form. 13 x 19.
Prezo : 10.80 fr. fr.

Vi trovos en ĉi tiu volumo multajn meditigajn artikolojn, multajn instigojn k konsilojn ; vi pli ol iam konvinkiĝos pri la neceso de la esperanta lingvo k precipe de la laborista esperantismo. Ankaŭ la demando pri la organiza formo estos al vi pli klara. La granda varieco de la materialo agrabligas la legadon de la libro. Artaj desegnetoj ornamas la diversajn ĉapitrojn.

Mendu ĉe SAT, 23, Rue Boyer, Paris XX.